

# ESPERANTO

## ★ TRIUMFANTA ★

Internacia

SEMAJNA

Neŭtrala

Abono ĉiu pagas laŭ la taga kurzo de sia propra valuto, se eble per ŝtataj monbiletoj en rekomendita letero, aŭ per ĉeko, sed ne per poŝtmandato. — Abonantoj, kies abono estas finiĝonta, ricevas ĝustatempe **admoniton**. — Abonoj ĉiuj estas komencataj per iu ajn numero.

Por Abono oni sendu laŭvole altan sumon, kaj ni liveros tiom da numeroj, por kiom valoras la pago. — **Prezo de unu numero:** 0.06 dolaro, 0.15 guld., 0.24 sved. kr., 0.50 svis. fr., 0.50 dana aŭ norvega kr., 0.50 peseto, 3½ pencoj, 0.50 fr. aŭ belg. fr., 0.70 lito, 1.20 fmk., 1.40 ĉ. kr., 6 germ. mk. (por ballaj kaj balkanaj ŝtatoj), 3 germ. mk. (por rusoj), 10 hung. kr., 50 pol. mk., 120 aŭstr. kr.; internacie 1 respond. kupono.

Por adresŝanĝoj ni kalkulas la prezon de 3 numeroj. — Liston de niaj **Abonejoj** en diversaj landoj — vidu sur paĝo 41. — Germanoj abonu nur ĉe sia poŝtoficejo (kvaronjare 48 mk.); senpre alsendo sub banderolo — kostas por germanoj po numero 7 mk.

**ELDONANTOJ:**  
D-ro L. Zamenhof, Warszawa (Varsovio)  
W. M. Page, adv., Edinburgh  
Ernest Archdeacon, Paris  
J. Gili Norta, Barcelona  
Teo Jung, Köln (Kolonia)  
Frans Schoofs, Antwerpen  
P. v. Medem, bankdirektoro, Kaunas (Kovno)

**REDAKTOROJ:**  
Ĉef-redaktoro: Teo Jung.  
Kun-redaktoro: M. Butin.  
Feliĉona red.: Zanon.

**ADMINISTRISTREJO:**  
Horrem bei Köln, Germ.  
Poŝtekonto Köln 70863, por Teo Jung, Horrem.

**ANONCOJ**  
po cm<sup>2</sup> 0.10 svisa franko (aŭ ĉe antaŭpago 6 gmk.)  
Rabato laŭ interkonsento.

Jam nun

preparu por Helmski viajn pensojn kaj eventuale proponojn pri la Int. Organizo de la Esperantistoj!

Numero 94 :-: Antwerpen, Barcelona, Edinburgh, Kaunas, Köln, Paris, Warszawa :-: 23. Julio 1922.

# Premioj de 10000 Gmk. por Infanoj.

S-o van Heek, kiu jam ofte morale kaj finance subtenis nian movadon, nun disponigis la sumon de 10000 gmk. por premioj al infanoj de malpli ol 15 jaroj. Celo de la premiado estas ricevi materialon por pruvi la disvastiĝon de Esperanto inter infanoj. La materialo estas disponigita al la komisiono kreita en Praha kaj oficialigita de la Ĝeneva konferenco.

La kondiĉojn oni bonvolu legi en la hodiaŭa numero.

## Raporto de la Loka Varsovia Komitato por Starigo de Zamenhofa Monumento.

La Internacia Komitato por la supra celo konsistas el: Iniciantoj: Prof. Th. Carr-Paris, generalo Sebert-Paris, d-ro W. Róbin-Varsovio kaj s-o Ed. Stettler-Bern. Organiza Komitato: s-o J. M. Warden-Edinburgh, s-o advokato W. M. Page-Edinburgh, honora kasisto kaj s-o J. D. Applebaum-Liverpool, honora sekretario.

La Internacia Komitato starigis en Varsovio Lokan Komitaton sub prezido de d-ro W. Róbin. En la Lokan Komitaton estis invitataj: s-o ing. J. Teichfeld (vicprezidanto), d-ro J. Dubrowicz, s-o E. Lonkopolanski, s-o Leo Belmont, s-o J. Littauer, s-o A. Oberrotman kaj reprezentantoj de tri Varsoviaj Esperantistaj societoj: de la grupo „Konkordo“ s-o d-ro J. Krenicki, de la grupo „Laboro“ s-o K. Domoslawski, de la grupo „Pola Esp. Societo“ s-o J. Kostecki.

Laŭ la decido de Praha Kongreso la Loka Komitato prenis sur sin la teknikan esploron de la monumenta demando. Ni estas en ĉiama interrilato kun la familianoj de la Karmemora Majstro. Dank' al tio ni povis ricevi ĝustajn informojn kaj gravajn konsilojn.

Al la tombejo estis deligita s-o ing. J. Teichfeld, kiu mezuris la lokon, interparolis kun la tombej-

estraro kaj kolektis necesajn detalojn pri la monumento.

La tombeja estraro volonte konsentis largigi la tombolokon, t. e. aldoni por malgranda sumo terpacon. Tio estas grava akto, ĉar la spaco estis ĝis nun iro eta, kaj la monumento multe perdis pro mallargeco.

En kelkaj kunsidoj de la Loka Komitato estis diskutitaj la demandoj pri proksimuma alteco de la estonta monumento amplekso, materialo, prezo, skulptistoj, konkurso ktp. Ĉi tiuj demandoj estis al ni prezentitaj de la kongresa sekretario de la Internacia Komitato, s-o Applebaum.

Ni fiksas la altecon je 2½ ĝis 3 metroj, la amplekson 1,15—2,00 m; la materialon granito, la proksimuman koston je 3 milionoj da polaj markoj — hodiaŭ 200 sterlingaj pundoj.

Nun ekstaris la demando, kiamaniere ricevi taŭgan, belan, artistan projekton de monumento. Ekzistis propono de arango de tutmonda konkurso por tiu celo. La Internacia Monumenta Komitato konsentis oferi sufiĉe grandan sumon por la plej bona projekto de monumento. La definitivaj teknikaj laboroj estus poste transdonataj al la Loka Varsovia Komitato por plenumo.

Sed post pli profunda konsidero la Internacia Komitato decidis ne aranĝi tutmondan konkurson. Jen la pravaj motivoj de unu el fervoraj membroj de la Internacia Monumenta Komitato s-o Page. Li skribas: „Laŭ la fotografajo de la tombo, kiun mi vidis, mi pensas, ke ne estas multe da loko por okulfrapanta tombŝtono. Je ĉiuj flankoj estas pli-malpli malbelaj tombokonstruaĵoj. Ni deziras certe artan, graciان, taŭgan monumenton; ĉu estas



Gaj- kaj Gejun-uloj

(anoj de Nordorienta Esp. Federacio de Angllando), ekskursintaj de Newcastle al Wylam en la valo de l'rivero Tyne. Unu junulo tenas numeron de ET.

la plej fama skulptisto en Varsovio, kies arto estas konata en Eŭropo, kaj demandi al li pri taŭga monumento; peti de li konsilon ĝeneralan pri la afero ktp... Ni devas agi laŭ plej sava kaj praktika maniero, kaj mi pensas, ke vi devas skribi al la Loka Komitato en Varsovio kaj peti ĝian konsilon pri nia ideo.

La Varsovia Loka Komitato, preparolinte tiun demandon, unuvoĉe aprobis ĝin. Sed, turni sin al la plej fama skulptisto ŝajnis al ni nefacile, ĉar la elekto eble estus iro subjektiva kaj povus elvoki riproĉojn. Tial ni decidis proponi al la Internacia Komitato aranĝi konkurson, sed ne internacian, nur pure lokan, pollandan. Motivoj: la lokaj skulptistoj bone konas la situacion kaj karakteron de la tombejo, ili povas fari studojn sur la loko mem kaj adapti la projekton al la cirkonstancoj kaj kondiĉoj. Samtempe la enlanda konkurso farus bonan propagandon, altirus ĝeneralan atenton al nia afero.

La Internacia Monumenta Komitato plene aprobis la proponon pri la „loka konkurso“ en la letero de 25. 2. 1922, oferis por tiu celo la sumon de 20 sterlingaj pundoj kaj lasis la detalan prilaboron al la Loka Varsovia Komitato. La definitivan

eble kontentige efektiviĝi nian celon? Eble tre simpla monumento estus la plej ĝusta? Mi opinias, post konsiderado, ke internacia konkurso ne donos al ni plej bonan rezulton. Ekzemple, artisto en Barcelono aŭ en Firenzo povas desegni tre belan desegnon, sed monumento laŭ ĝi en la kolekto de vulgaraĵoj monumentoj, kiel en la tombejo de Varsovio, estas tute perdita kaj forfuŝita. Mi opinias, ke oni devas iri al

akcepton de la premiata projekto faru la Loka Komitato post kontrolo de la Internacia Komitato kaj post interkonsento kun familianoj de la Majstro.

En la lasta kunsido de la Loka Komitato estis decidita anonci la konkurson inter pollandaj skulptistoj. Dividi la sumon de 20 sterlingaj pundoj je 2 premioj (la I-a 12 sterlingaj pundoj, la II-a 6 sterlingaj pundoj). Rezervi la superfluaĵn 2 sterlingajn pundojn por la anoncelspezoj. La tekston de anoncata konkurso ni aldonas ĉi sube.

Ni esperu, ke la konkurso donos bonajn fruktojn, tiom pli, ke ekinteresiĝis pri la monumento unu el Varsoviaj skulptistoj, kiu persone konsilis la Majstron kaj eĉ verkis du bonajn bustojn, ekspoziciitajn en Universalaĵ Kongresoj Esperantistal.

Mi finas la raporton per mencio pri du ideoj rilate la aspekton de la monumento. Unu konsilas verki kvinangulan kolonon el granito; kvinanguleco simbolligu la kvin partojn de la mondo. La dua ideo: ke la monumento staru sur bazo de diversspecaj ŝtonoj aŭ marmoroj, provizitaj de multaj partoj de terglobo. Tiujn ŝtonojn ni povus havigi de la diversaj grupoj aŭ izolaj Esperantistoj, loĝantaj en diversaj partoj de la mondo, kiuj alsendos ilin al Varsovio. Ni povas ekzemple peti la grupon en Aŭstralio, Italujo, Usono ktp. eĉ ekli en siaj regionoj tiujn ŝtonojn aŭ granitojn aŭ marmorojn, kiuj estas karakterizaj de tiuj landoj kaj regionoj. Sur ĉiu ŝtono estu cizita la nomo de la loko, de kie ĝi venas.

La Internacia Monumenta Komitato nun alpaŝas al la kolekto de mono. Ni estas certaj, ke la granda kaj bela celo instigos ĉiujn samideanojn al malŝparaj donacoj. Ni devas montri al la mondo, ke ni scias honoru nian karmemoran Majstron!

Por la Komitato:  
D-ro W. Róbin.

### Konkurso por la monumento de D-ro L. L. Zamenhof.

1. La Estraro de la asocio „Skulpto“ kune kun la „Komitato por Konstruo de la Monumento de D-ro Zamenhof“ anoncas konkurson de la Monumento por D-ro L. L. Zamenhof, aŭtoro de la lingvo Esperanto.
2. Loko: hebrea tombejo en Varsovio.
3. Amplekso de la tombo: 222x115 cm.
4. Grandeco de la projekto en ĝlps: 50—70 cm.

## Judaso Iskariot.

Drama fragmento de A. Kallas.

### Personoj:

Judaso Iskariot  
Lazaro  
Marta  
Mario } fratinoj de Lazaro  
Nikodemus el Arametea  
Rotestro el Romo  
Soldatoj romaj, popolo.

(La sceno prezentas parton de ombrumata ĝardeno kaj terasan enirejon en la domon de Lazaro en Betania. Maldekstre flanko konstruaĵo; en la fundo muro de l' ĝardeno. Malantaŭ la muro — vojo el kaj al urbo. En la perspektivo — montetoj kaj oliv-arbetaro.)

### Sceno II.

Lazaro, Nikodemus, Jozefo, poste Judaso kaj fine Mario.

Nikodemus. Ĉu vi estas certa, Lazaro, ke la romaj ekzekutistoj ne trovos Lin ĉi tie?

Lazaro. En mian hejmon eniri ili ne kuraĝos; la vicreganto evitos certe ĉion, kio kaŭzus plendojn. Ili deziras renovigi la bonajn rilatojn kun la civitanoj de Judujo.

Nikodemus. Kaj se iu la Majstron montros?

Lazaro. Kiu ekkuraĝus?!

Jozefo (rimarkinte el la fundo Judason proksimiĝantan). Jen Judaso!

Judaso. Jes... jen mi... al mi ŝajnis, ke la voĉo de Jozefo forte tremis. (Al Jozefo:) Helpis al vi la nokto kaj la timo, kaj pro tio vi ekimis Jozefo. Vin?!

Judaso. Malsaĝulojn, kiujn vi aŭskultas.

Nikodemus. Vi forgesas vin, kara frato!

Judaso. Ke antaŭ kortega eminentulo mi staras, mi scias...

Jozefo. La kortegajn titolojn ni estis forgesintaj trapasinte la sojlon, kie la Majstro estas.

Nikodemus. Ni estas viaj amikoj.

Jozefo. Ni volas malebligi la malfeliĉon, kiu al nia Majstro minacas flanke de la ekzekutistoj.

Judaso. Vi venion helpos.

Nikodemus. Se ni scias, kio minacas al Li, ni povas forigi la malfeliĉon.

Judaso. Ne ĉiuokaze, kaj eĉ, se tiel estus, ni devus meti sur la altaron centoble pli grandan oferon.

Jozefo. Ni ne bedaŭras elaceton.

Judaso. Se ne elaceton, tamen oferon oni bezonas? La popolo atendas miraklon, kaj la mondo estas savanta; vi ne komprenas...

Nikodemus. Mi aŭdis, ke oni parolas pri mondpereo.

Judaso. La mondo ne pereos. La plej grandan oferon ĝi englutos por konserviĝi por la penso...

Jozefo. Por la Dia?!

Judaso. Por tiu, kiu novan formon forĝas.

Nikodemus. Ĉu vi ne blasfemas, filo de Simon.

Judaso. Kulpigu min, filo de Ezeĥiel!

Nikodemus. Mi ne estas denunciisto.

Lazaro. Ĉesigu la malpacon. Ni prikonsilu la defendon de l' Majstro.

Judaso. Antaŭe demandu, ĉu Li konsentos, ke oni lin defendu.

Jozefo. Ĉu al vi sola la Majstro malkovris siajn intencojn? Mi ne opinias tiel...

Judaso. Li mem diros, ĉu mi devas iri kaj agi.

Lazaro. Sed ni altabligu. Miaj fratinoj koleros pro nia malrapidemo. Kiaj novaĵoj, Mario?

Mario. La Majstro kune kun la disciploj altabligiĝis kaj demandis, kien vi iris. Kaj pri Judaso li demandis. Lin la Majstro pleje ekamis. (Si starigas sur la ŝtuparon de l' teraso kruĉon kaj vazon, poste ŝi rektigas la branĉojn de l' floraro, per kiuj ŝi ornamis la enirpordon de l' domo.)

Lazaro. Ni jam iras... Kaj vi, fratino, atentu, ke ne enŝteligu ĉi tien perfido... Klion vi rigardas, Judaso?!

Judaso (prenis en la manojn la vazon kaj ĝin rigardas). Mi kalkulas, kiom povis kosti ĉi tiuj aromajoj.

Lazaro (ridante). Ĉiam la sama! Sparema, kiel decas al kasisto de malriĉulaj fratoj. — Ni iru! (Li foriras kun Nikodemus kaj Jozefo, ne rimarkinte, ke Judaso restis.)

### Sceno III.

Judaso kaj Mario.

Judaso. Ĉu vi ne povis vendi tiujn aromajojn je iridek groŝoj kaj disdoni al malriĉuloj?

Mario. Ekkaptis vin ia malgaja meditado...

Judaso. Mi spionis la stelon, kiu kvazaŭ haltis en la kurado.

Mario. Stelon?... Klun?!

Judaso. Vi ne ekvidos ĝin. Ĝi estis penso, kiu longe rondiras en la tuta mondo, kiel sin turnas luno kaj aliaj planedoj... Mi sentas la pezon de malsuprenfalanta stelo.

Mario. Bone, ke vin ne aŭdas mia fratino Marta! Ŝi estus dirinta, ke vin ekposedis malbona malsano, kaj tuj ŝi kurus brogi por vi herbojn kuracajn por forpeli el vi la malsanon.

Judaso. Kaj vi, Mario?

Mario. Mi ne faros tion, sciante, ke estas pensoj tiel grandaj kaj belaj, kiuj la steloj.

Judaso. Ĉu vi ekkonis lam tian penson?!

Mario. Ŝajnas al mi, ke nia Majstro plej dolĉa vekas kaj movas per vorto la stelojn... Ĉu povis vin, Judaso, tiel terure influi la vortoj de l' Majstro?

Judaso. Mi suferas... Miaj brakoj etendiĝas kaj ekpuŝas la muron... Kaj tiun muron oni devas disrompi!... La mondon gajni por la penso, al kiu estas tro malvaste ĉi tie...

Mario. Vi aspektas nun terure. En viaj okuloj ekbrilis kaj estingiĝis fajrobriko!...

Judaso. Ne fortru... restu ĉe mi... momenton nur restu... mi amas vin... Mi amas...

Mario. Ne parolu plu...

Judaso. Ĉion Li forprenis de mi. La amon de l' popolo, la penson, kiun mi karesis — kaj poste — ankaŭ vin Li forprenis de mi. Jes, ankaŭ vin li forprenis de mi. Ne vian korpon, ĉar vi estas por li, kiel tiuj floroj, kiujn li rigardas ame, sed neniam ilin tuŝas. Animon vian Li forprenis de mi — animon vian, kiu por mia ajmo estis la alia duono.

Mario. Lasu min!...

Judaso. Aŭskultu... Min ĉiuj malbenos; mi estos inter vi kiel fava hundo... malestimata, pelata, persekutata... Sed vi sola sciu, ke mi estas granda kaj potenca. Mi, Judaso Iskariot; al Li oni konstruos preĝejon kaj donos la regadon super la mondo. Kaj la ekdubintoj denove fidos. Kaj la nekreduloj kredos kaj postsekvos Lin...

Mario. Do vi Lin ankaŭ amas?!

Judaso. Mi ekamis Lin pli ol vi ĉiuj. Mia penso pri Li estis kun mi, antaŭ ol Li estis kun vi.

Mario. Kaj nun?!

5. Eleko de la materialo dependas de la projekto.

6. Estas fiksitaj 2 premioj: 1-a 12 pundoj sterlingaj, 2-a 6 pundoj sterlingaj.

7. La ricevo de premio ne decidus pri apliko al la konstruo de monumento.

8. La templimo por la konkurso estas 1. 9. 1922.

9. La projektoj estas sendotaj al la „Artista Societo“ en Warszawa, str. Trebacka 10, provizotaj de insigno, kun koverto, enhavanta la nomon de l' aŭtoro.

10. „Jury“ konsistas el artistoj-skulptistoj s-oj J. Szczepkowski, St. Ostrowski, Ap. Glowinski kaj el 2 membroj de la „Komitato por Konstruo de Z. M.“

11. La Monumento devas esti preta post unu jaro: alteco 2,5 ĝis 3 metroj; la premiitaj laboroj fariĝos propraj de la „Komitato por Konstruo de Z. M.“

Warszawa, 1. 7. 1922.

La Prezidanto de la Asocio „Skulpto“:

Jan Szczepkowski.

La Sekretario:

J. Broniewska.

## Turku (Åbo).

En iu numero de ET, mi memoras, la redaktoro esprimis deziron ricevi artikolojn priskribantaj diversajn lokojn, kiuj eble havus intereson por la partoprenantoj de la XIV-a. Ĉar mi pensas, ke parto de la kongresvizitontoj veturos tra Turku, mi penos doni kelkajn scigojn pri tiu urbo.

Turku, svede Åbo (elp. Obu) kuŝas en sud-okcidenta Finnlando sur ambaŭ bordoj de la rivero Aura, ĉe ĝia fluo al Baltika Maro. Antaŭ ĝi etendiĝas vasta insularo, kiu en okcidento ligiĝas al Ålandoj.

Turku estas la plej malnova urbo de Finnlando. Ĝis la jaro 1812 ĝi estis la ĉefurbo kaj ankoraŭ ĝi estas laŭ la nombro de loĝantoj (ĉ. 85 000) dua urbo de la lando. Ĝi estis sidejo de la unua universitato (fond. 1640) ĝis 1827. Sekve de granda brulado, kiu en la nomita jaro detruis 7/8 de la tuta urbo, la universitato estis translokitita en la novan ĉefurbon Helsinko. Antaŭ kelkaj jaroj fondiĝis nova akademio svedlingva kaj tiun ĉi someron komencos dua universitato (finlingva) sian laboron.

La ĉefaj vidindaĵoj estas la malnova kastelo kaj la katedralo, la solaj restaĵoj de la pli malnovaj tempoj. Ambaŭ estas konstruitaj ĉ. 1250 ĝis 1300. La kastelo havis siajn plej brilajn tagojn, kiam en ĝi loĝis kaj regis duko Johano (poste sveda reĝo Johano III.) kun sia pola edzino Katarino. Nuntempe la kastelo estas historia muzeo. La katedralo estas nekutime impona en la modesteco de Nordo. En ĝi estas enterigitaj multaj finnaj kaj svedaj nobeluloj.

Aliaj vidindaĵoj estas Artmuzeo kaj Biblioteko, ambaŭ donacoj al la urbo de mecenatoj. Dum la somero oni povas ĝui belan vidojn de altaĵoj Sappalinn kaj Observatoria montoj. La proksimaj insuloj estas ankaŭ belaj lokoj. Se oni faras ekskurseton per ŝipo, oni povas vidi multajn bele kuŝantajn vilaojn sur la bordoj de la insuloj. Precipe la insulo „Runsala“ tiras al si ĉies atenton. Iom pli malproksime (ĉ. 15 km) troviĝas malgranda urbo Nådendal, banloko kaj tre ĝuata ekskursejo de Turkuanoj. Ĝi estas eble la plej malgranda urbo en Eŭropo kun ĉ. 800 loĝantoj. — Turku havas multajn industriojn. Estas koton-, drap-, tabak-, porcelan-, kaj suker-fabrikejoj. Krome en la urbo estas ŝipkonstruejoj kaj maŝinfabrikejoj. Turku estas ankaŭ tre grava haveno por la lando. Ĝi estas la plej oportuna vintrohaveno, kio montrigis precipe dum la lasta tre malfacila vintro. En la haveno estas bonaj provizejoj kaj modernaj iloj por plirapidigi la

ŝarĝadon kaj malŝarĝadon. Urbaj ŝipkompanioj havas regulan ŝipradon i. a. al Lübeck kaj Stockholm. La importo tra la urbo valoris en jaro 1920: 740 milionojn da markoj, kaj la eksporto: 276 milionojn, el kiu sumo papero en valoro de 149 milionoj kaj lignaĵo 86 milionoj.

La Esperanta movado ne estas sufiĉe vigla. En la urbo estas tamen societo „Esperanto-Grajneto“, kies anoj estas pretaj laŭ siaj fortoj kaj kapabloj helpi al samideanoj, kiuj traveturos al la XIV-a. Kiel oni povas legi en la komunikoj de la Kongresa Komitato, estas regula ŝiprado al Stockholm. La „grajnetanoj“ volonte renkontos kaj helpas al tiuj, kiuj uzos la nomitan vojon. Ĉiuokaze estus bone, se la vizitontoj sciigus pri sia alveno al s-o Ilmari Ekström, adr. Kaskisgatan 14, Åbo.

I. E.

kontraŭ laborado de grupoj, por fondi sisteme nian Internacian literaturon.

Tamen, tian direktadon, kun kiu mi konsentas, mi lasas al pli kapablaj samideanoj kaj nur deziras atentigi pri bezono gajni tempon kaj profiti fortojn, kiuj nuntempe perdiĝas.

Oni parolas pri superaj kursoj, literaturaj kursoj, literaturaj rondetoj k. c. Jen la fontoj, kies akvoj riĉigos la riveron. Anstataŭ pastempaj ekzercoj: celaj tradukoj.

Ni tute ne bezonas originalan verkaron. Nia lingvo estas helpa, kaj ĝi devas helpi ĉie.

Instruistoj, inĝenieroj, kuracistoj... en ĉiuj branĉoj lernas tradukitajn librojn. En Hispanlando oni ordinare tradukas de franca lingvo. En ĉi tiuj jarcentoj estas ni multaj, kiuj lernas anglan kaj germanan lingvojn, kaj oni rekte tradukis verkojn,



## El la urbo de la Dekkvara

Supre:  
Kontorhalo de Privata Banko,  
konstruita de Lars Sonck  
kaj Walter Jung  
Pordega muro de la Telefon-  
Centro, konstruita de  
Lars Sonck.

Dekstre kaj maldekstre:  
Finnaj enirejoj.

## To be or not to be.

Soldatoj ofte diras la nombron anstataŭ la nomon de regimento, al kiu ili apartenas. Tiel ni legas en ĉarma rakonto el „Cuore“ de Edmondo de Amicis, kiam la reĝo rekonas en laboristo estintan kamaradon.

S-o Schoofs kaj mi apartenas al 1906. Ni ambaŭ estas Esperantistoj de la jaro, kiam okazis la kongreso en Genève, kie nia amata Privat sukcesis kun bona ploniraro en la gravega fakto de nia historio: la Konferenco por Lernejoj.

Ce s-o Schoofs en Aniverpeno mi havis okazon akiri numeron de ET, kies unua artikolo de M. Kalina „To be or not to be“ ne nur ne atakas mian ideon pri kultura laborado per Esperanto, sed vere konsentas kaj eĉ proponas fondi kapitalon por garantii la eldonon de Esperanta verkaro.

Dum mi vojaĝas al Helsingfors, mi iom studas sociajn aferojn, kaj eĉ mi havis okazon paroli kun Fayol (Fajol) en Parizo, la fondinto de ekonomia sistemo; sekve mi ne povus forgesi la valoron kaj absolutan necesecon de aliaj elementoj,

kontraŭ antaŭa kutimo ilin traduki de francaj tradukoj.

Nun, se Esperanto povus prezenti (kaj mi estas certa, ke tio iam okazos) rektajn tradukojn de fakospecialistoj, tiel por geografo, historio, matematiko, fiziko, medicino, inĝeniersciencoj k.c. kiel ankaŭ sekvu la volon montritan de nia en koroj vivanta Majstro, Kabe, Grabowski ktp., ni povus Jesi, ke alvenis glora momento por la lingvo Esperanto kaj ankaŭ por Esperantismo.

Mi akcentas denove, ke ni bezonas kunigi ĉiujn fortojn, kaj oni devas profiti personajn kvalitejn de apartaj individuoj por estiĝo de verkoj; eĉ en nacilingvaj libroj aperis bonegaj ekzemploj. Mi mem kunportas francan libron verkitan de finnlandanoj, kiun mi legas kun plezuro, kaj mi estas certa, ke malmultaj libroj povus atingi tian gradon de intereso, se ili estus verkitaj de unu sola aŭtoro. Krom tio, se oni respondus, ke verkado kaj tradukado estas malsimilaj aferoj, mi alvokus plej simplan leĝon de socia ekonomio pri labordivido.

## Feliĉa.

Estas la unua tago de l' majo. Super teron kaj homojn flugas printempa rido. —

Ŝajnis, kvazaŭ nia Di-Sinjoro hodiaŭ finis ion tre bonan; ĉar ĉio estas tiel freŝa, tiel gaja, tiel plena je espero, kaj post mallonga pluveto eĉ brilas la suno...

Ho, kiel sukverdaĵoj tiuj herbejoj, kiel bela la tero tuta! —

Kaj kiajn dolĉajn vortojn mi aŭskultis hodiaŭ!? De kie ili venis? Ĉu ne estis nia Di-Sinjoro, kiu interparolis kun mi, kiu igis min tiel ĝoja, tiel sata, tiel senfine kontenta...?

Kial ja mi ridis, neniun malĝoja rigardo eliris el miaj okuloj, mi sentis ĝin, vere mi sentas ĝin ankoraŭ nun, ili sole ridis... sole ridis...

Ho, ke mi sciu kanton, ke mi sciu vorton similan al ĝi, al tiu mirplena tago! Vi iero, tiom abunda, vi mondo, tiom riĉa, redonu al mi ankoraŭ unu fojon tiun belegan tagon...!

Krapohl-Funken.

## Humoro.

Ankaŭ batalanto.

Karlo al Paŭlo: Ĝus mi forsendis mian kotizon por dumviva abonanteco al ET. Ĉu vi ne ankaŭ fariĝos?

Paŭlo: Eh! Kiu scias, ĉu mi post tri jaroj ankoraŭ estos Esperantisto!

Karlo: Aha! Ankaŭ unu el ili, por kiuj Esperanto estas laŭmoda sporto.

Vizitu la Antaŭkongresojn!

Tio fine tute ne signifas, ke mi ne volas konsideri momenton la grandan valoron de personeco en verko, sed mi nur volas, ke oni profitu fortojn, kiuj perdiĝas, simile al akvogutoj suĉataj de dezertsablara anstataŭ nutri patrino la teron, kiu proprigos al si tian nutraĵon kaj prezentos ĝin denove en plej riĉaj fruktoj.

Aŭtoroj, kiuj sin sentas kapablaj labori sendepende kaj sukcese, ili daŭrigu sian vojon.

Por fini ĉi tiujn liniojn (pli longajn, ol mi ordinare amas verki por ĵurnaloj) mi diros al M. Kalina: Belega afero fondi kapitalon por garantii eldonon, mi konsentas kaj manpremas vin; sed, kion eldoni? Ĉerte la rezultatojn de laboroj, ĉu ne vere?

Horrem bei Köln, julio.

Felikso Diez,

Profesoro ĉe Komerca Universitato,  
Bilbao, Hispanlando.

## Pri la projekto de Universala Ligo Esperantista.

En sia kunveno de 29. junio la estraro de Sveda Esp. Federacio pritraktis la demandon pri starigo de Universala Ligo Esperantista kaj alprenis sekvantan rezolucion:

La estraro de Sveda Esperanto Federacio, pritraktinte la proponon de s-oj Page, Chavet k. a. pri starigo de Universala Ligo Esperantista, esprimas sian konvinkon pri la grava bezono de unuiĝo de la Esperantistoj tutmondaj por krei firman bazon por la Akademio, la Lingva Komitato, la kongresoj kaj la ĝenerala agado. Firma kaj praktika organizaĵo estas necesa por la antaŭenmarŝo de nia afero.

Ni tamen konsideras, ke al tia Universala Ligo ne devos aliĝi lokaj grupoj aŭ solaj membroj, sed nur la tutlandaj aŭ naciaj asocioj; tiujn asociojn reprezentos ĝiaj estraroj; je la tutmondaj kongresoj Esperantistaj la Universala Ligo kunsidos; en tiuj kunsidoj rajtos partopreni nur delegitoj elektitaj de la aliĝintaj asocioj.

Se eble, UEA fariĝu Universala Ligo Esperantista (kies nomo prefere estu Universala Esperantista Federacio pro la malbona signifo de la vorto „ligo“ en multaj landoj, ankaŭ en Svedujo). La nunaj lokaj delegitoj de UEA konservu siajn taskojn.

Necese estas eviti la multnombrecon de organizaĵoj, ĉar nemultaj Esperantistoj povas pagi kotizaĵojn al ĉiuj. Krei internacian ligan de apartaj (personaj) membroj estas nepraktike, kaj la administrado estos multekosta, tial ni kreu internacian unuiĝon de regionaj organizaĵoj Esperantistaj.

## Al universitataj studentoj ĉiulandaj.

Rememorigante la decidon faritan en Praha dum stud. faka kunsido pri fondo de „Studenta Ligo Esperantista“ dum la XIV-a en Helsinko, la Studenta Esperantista Societo de Helsinko petas plej kompleze ĉiujn gekolegojn plej baldaŭ sendi proponojn kaj deziraĵojn por la nomita ligo, ekz. pri celoj, organizado, gazeto, ebla unuiĝo kun iu alia konvena ligo, kotizaĵoj ktp., kaj antaŭ ĉio sciligi pri la progreso de Esperanto inter studentaro de via lando. Ĉio ĉi por preparo de stud. faka kunsido en Helsinko.

Dezirante koran bonalvenon al la XIV-a al ĉiuj gestudentoj salutas kolege

Studenta Esperantista Societo de Helsinko  
per Helmi Wahlqvist,  
del. de S. L. E. por Finnlando.

Adreso: L. K. K. de la XIV-a Kongreso de Esperanto, Helsinko.

## Al mia patrino.

de Heinrich Heine.

I.

Mi ne inklinas timi superulojn,  
Fiero diktas agi neafekte;  
Se eĉ la reĝo min rigardus rekte,  
Mi certe ne mallevus la okulojn.

Sed en ĉeesto dolĉa kaj trankvila  
De vi, patrino kara, min forlasas  
La obstinemo, la fiero pasas,  
Kaj min ekregas sento plenumila.

Animo via venkas min mistere,  
Animo alta, kiu saĝe, klare  
Kun brilo sin eksvingas supertere!

Kaj tamen zorgo premas la memoron,  
Ĉu kontraŭvole verŝis mi doloron  
En vian, tiel min amantan koron?

II.

Mi iam vin forlasis pasiplene,  
Travagi volis mi la tutan teron,  
En koro firmtenante la esperon,  
La amon fine kapti ĉirkaŭpreni.

En ĉiu strato serĉis mi la amon,  
Ĉe ĉiu pordo manojn mi etendis,  
Almozpetante la rigardojn sendis,  
Sed moke oni donis nur malamon.

Kaj vage serĉis mi la amon ĉiam,  
Sed amon, — amon trovis mi neniam,  
Malsana mi revenis kaj sen amo.

Jen vi salutis min komprene, varme,  
Kaj en okuloj viaj ĝoje-larme  
Ekbrilis — la serĉita, dolĉa amo!

Judas-o. Mi Lin transdonos en la manojn de l' ekzekutistoj.

Mario. Malbenita!

Judas-o. Pli frue ol vian malbenon mi ek-sentis Lian amon — kaj jen mi estas forta, ne timante vian malamon.

Mario. Freneza vi estas, frenezaj!

Judas-o. Kaj ankaŭ vi ne povas min kompreni?

Mario. Sed... kial... kial vi Lin volas perdis?...!

Judas-o. Vi nomas tion — perfido, kaj mi tamen plenumas nur ilan volon! La manoj de l' tirano makuligis per la sango de l' Elektilo, kaj finpleniĝos la pekoj de Romo, kaj tiam falos Jupitero, la estro de l' mondo kaj falos Kapitolio. Romo estas nia plej granda malamiko. Neniam antaŭe Izraelo havis tian malamikon. Kaj tiel longe regos Romo super la mondo, tiel longe daŭros la malfeliĉoj super Izraelo...

Tradukis el pola lingvo  
Salo Grenkamp-Kornfeld.

## Kio estas la vivo?

Tradukis el finna lingvo  
Kalle Suuronen, Kokemäki.

Unu tagon, kiam la birdoj estis kantintaj ĝis laciĝo, malgranda cerbuma fringolo interrompis la silenton kaj demandis:

„Kio estas la vivo?“

La aliaj preskaŭ ekfalis pro la interrompo, sed tuj malgranda aliaĵo respondis:

„Vivo estas kantado.“

„Ne, ĝi estas batalado en mallumo!“ diris talpo, kiu preskaŭ neniam estis elĝinta sian kapon el la tero.

# La granda premiado de Esp. infanoj. — 10000 mk. por skribaĵoj de infanoj.

## Kondiĉoj.

1. La skribaĵo povas esti pri kiu ajn temo.
2. La skribaĵo devas ampleksi minimume du paĝojn kaj maksimume kvar.
3. La skribaĵo devas esti skribita per inko sur bona papero senerare kaj bone legeble.
4. La skribaĵo devas esti skribita nur sur unu flanko de la papero, por ke oni povu ĝin glui sur kartono.
5. En la maldekstra supra angulo de la skribaĵo la infano surglui, se eble, sian fotografon, kaj subskribu tre legeble sian nomon, adreson, naskiĝtagon, sekson kaj la lernejon, en kiu ĝi lernis Esperanton.

## XII-a Germana Esperanto-Kongreso en Plauen (Vogtlando).

### Unua komunikado.

1. **Dato kaj ejo de la kongreso.**  
La kongreso okazos je Pentekosto, la 19. ĝis 22. majo 1923 en Plauen, „Centralhalle“, Strassbergerstr.
2. **Aliĝo.**  
Samideanoj, dezirantaj aliĝi al la XII-a, estas petataj uzi la aliĝilojn, kiuj estos dissendataj kun la aŭgusto-numero de „Germana Esperantisto“ kaj kun aliaj Esp. gazetoj.  
Samideanoj, kiuj tiel ne ricevos la aliĝilon, petu ĝin de la Loka Kongresa Komitato.  
Samideanoj, kiuj jam nun aliĝis, sed pro neantaŭvideblaj kaŭzoj ne povos ĉeesti la kongreson, ricevos, se ili tion deziras, 75% de la pagita kotizo, se ili pri tio sciligos la L. K. K. antaŭ la 1-a majo.  
En la kongresan nomaron estos enskribitaj nur la personoj, kiuj aliĝis kaj pagis la kongresan kotizon.
3. **Kotizo.**  
Sekve de la daŭranta plialtiĝo de la prezoj, ni devis fiksi — ne volonte — la kotizon je mk. 60.— Por samfamiianoj la kotizo malaltiĝas je mk. 30.— La samideanoj estas korege petataj, kiel eble plej baldaŭ aliĝi kaj pagi la kotizon; ĉar por la bona prosperado de la porkongresaj laboroj estas necese, ke la L. K. K. jam en komenco havu sufiĉe da mono.  
La kotizoj oni bonvolu sendi al Vogtländische Bank, Abteilung der Allgemeinen Deutschen Credit-Anstalt, zu Gunsten Konto Nr. 5027/1 für Deutschen Esperanto-Bund E. V., Ortsgruppe Plauen i. V.  
La Vogtländische Bank havas „Postscheckkonto Leipzig“ Nr. 598 kaj „Gemeindeverbands-girokonto Plauen Nr. 24.“
4. **Garantia Fondo.**  
Por certigi la ekonomian rezulton, estas fondita speciala garantia fondo, al kiu la samideanoj estas petataj noti garantiĝojn. En nia urbo Plauen ĝis nun estas notitaj 20000 markojn. La garantiĝitaj sumoj estos ekasigataj nur en la okazo, ke la kongresaj elspezoj superos la enspezojn, kaj proporcie laŭ la ebla malprofito. Sed dankemaj ni estas al tiuj samideanoj, kiuj sendus la notitan sumon al nia bankkonto Nr. 5028/1 „Garantiefonds für den Deutschen Esperanto-Kongress Plauen 1923“, kiun ni starigis je la jam nomita Vogtländische Bank, por ke ni povu labori per la mono. Ni resendas la sumojn tuj post la kongreso.
5. **Adreso por sciligoj kaj sendaĵoj:** Hermann Scheider, Plauen i. V., Gunoldstr. 40.

## Komerco.

### Invito.

Laŭ decido farita en Praha mi invitas al Faka Kunveno de Komercistoj okazanta en Helsinko dum la XIV-a Universala Kongreso de Esperanto.

Invitataj estas: Industriistoj, komercistoj, oficistoj. Nefakuloj scivolemaj estas petataj ne ĉeesti, ĉar estas labora faka kunsido.

Akuratane informon pri loko kaj dato oni ricevos en la kongresa oficejo de Helsinko.

En la nomo de la „Internacia Federacio IFKKL“:

Leander Tell

Sekr. de la Sveda asocio por komerca lingvo „FIH“, Stockholm, Svedio.

### Provizora programo.

1. Jara raporto.
2. Agada programo.
3. Organiza programo.
4. „Internacia Komerc Revuo“.
5. Foiroj, komercaj ĉambroj.
6. Propono pri arango de Internacia Konferenco pri Praktika Aplikado de Esperanto ĉe Komerc kaj Industrio, printempo 1923.  
Vizitantoj de tiu komercista konferenco kaj personoj, kiuj deziras prezenti temojn, estas petataj skribi al Universala Kongreso de Esperanto, „Fako Komercistoj“ en Helsinko (Finnlando), Kasarminkatu 20.  
Samtempe okazos la Pola Konferenco afable kunvokita de la Finlanda Foiro. Oni petas, ke ĉiuj personoj, kiuj zorgas pri foira reklamo Esperanta, sin anoncu al la nomita foiro. Ĉiuj oficialaj delegitoj de aliaj foiroj nepre devas ĉeesti tiun konferencon.

6. En la dekstra malsupra angulo la instruinto devas skribi la klarigon, ke la skribaĵo estas verkita sole de la infano, kies nomo estas skribita en la maldekstra supra angulo.

7. La infano devas esti ne pli aĝa ol 15-jara.  
8. Ĉiu infano el kiu ajn lando, kiu ensendos skribaĵon verkitan laŭ ĉi-supraj kondiĉoj al s-o G. van Heek en Hengelo (0), Steynstraat 72, Nederlando, rajtos elekti librojn je valoro de 75 germ. mk. el la literatura listo de la firmo Butin & Jung en Godesberg, Germanlando.

9. La sumo disponigita por la premiado estas 10000 germ. mk. Eventuale ĝi povas esti plialtigata per helpo de aliaj infan-amantoj. Ĉiuokaze pli ol centfrideko da infanoj povos ricevi premion. Do la unuaj havos plej bonan ŝancon.

## Internacia Komerc Revuo.

Ni aŭdas, ke s-o Unger — pro alia profesia okupado — vendas la eldonrajtojn pri „Internacia Komerc Revuo“ al konata eldonejo svisa, kiu havas filiojn en diversaj landoj. S-o Unger, kiu transloĝis al Genève (adreso: Case Mont Blanc) restas ĉefredaktisto, sed estos libera de eldona kaj administra laboro, kiujn plenumos nun faka eldonejo tute sperta pri tio.

La nova eldonejo de I. K. R., la firmo Furrer & Co. en Zürich (Svislando), Stampfenbachstr. 69, informas nin pri du tre gravaj firmoj, kiuj ekutiligas Esperanton por internacia reklamo:

Loga-Calculator S. A. en Zürich. Fabriko de kalkulo bazanta sur logaritma sistemo. Esperanta prospekto estas en preparo; anoncoj aperas en I. K. R.

Chocolats Tobler S. A. en Bern. Mondfama fabriko de svisa ĉokolado. Kvankam s-o Tobler estas konata kiel Idisto, li ne hezitis doni Esperantajn anoncojn al I. K. R.; tio pruvas larĝvidon kaj imitindan toleremon.

## Blinduloj.

### Por „Esperanta Ligilo“

ni ricevis plue: 230. Fritz Michalek, Reichenberg 2.50 kĉ. — 231. F. P. Rehner, Immensee 71.45 gmk. — 232. S-ino E. L. Osmond, London 26 gmk.

### Esp. kursoj en Düren kaj Hamburg.

En la blindulejo de Düren (Rejnlando, Germ.) vidanta blindul-instruisto gvidas Esperantan kurson al 15 lernantoj de la progresiga lernejo. Ankaŭ en blindul-instituto en Hamburg funkcias Esp. kurso.

## Kunveno de la estraro de Esp. Blindul-Ligo de Germanujo (Ebligo)

okazis la 8-an kaj 9-an de julio en Köln. S-o Kreitz, sekr. de Ebligo, salutis la kunvenon; s-o Selten, la prezidanto, parolis detale pri la laboroj de la ligo dum la unua jaro de ĝia ekzistado. Oni decidis interalie, sendi proponojn al la II-a Blindul-Esperantista Kongreso en Helsinko koncerne internacian vojaĝan rabaton por blinduloj, kunlaboron de blinduloj ĉe fakvortaroj (teknikaj vortaroj), statistikon pri blindul-profesioj kaj blindulmovado. Ebligo klopodos obteni monrimedojn por povi liveri al germanaj blindaj samideanoj la Braille-presistajn vortarojn malmultekoste. Ebligo publikigos alvokon en Esp. gazetoj, por ke vidantaj Esperantistoj lernu Braille-skrifton kaj transskribu Esp. librojn por blinduloj. Ebligo eldonos kvaronjaran gazeton „Blinda Esperantisto“ en germana kaj Esp. lingvoj.

Ni atentigas, ke al Ebligo povas aliĝi ĉiuj vidantaj Esperantistoj kiel subtenantoj anoj, ĉiuj legantoj de ET, pagante minimume 20 gmk. por 1922. Aliĝojn akceptas la sekretario J. Kreitz, Peschstr. 29, Kreuzau bei Düren, Rejnlando, Germ.

### En Ruslando.

Moskvaj blindulaj organizaĵoj sin turnis al s-o Valentinov, por ke li sendu al eksterlandaj gazetoj sciligon, ke en Ruslando tute forestas la ebleco iamaniere havigi necesajn tabulojn por reliefa skribado. Blindaj samideanoj ĉiulandaj estas petataj sendi superfluajn tabulojn al s-o M. S. Valentinov, Rusio, Moskvo, Cudovskoj per., N. 6, Komitato de Esperantistoj.

Bedaŭrinde rusaj blindaj Esperantistoj nun estas en tre embarasiga situacio kaj tute ne povos pagi kontraŭ la esperinda plenumo de sia peto.

Nun Esperanto estas oficiale instruata en du lernejoj por blinduloj en Moskvo.

## Laboristaro.

### Nederlanda Federacio de Laboristoj Esperantistaj

havis sian 7-an jarkunvenon dimanĉe, 9. julio, en belega salono „Nijverheid“ en Haarlem. Oni decidis denove aranĝi „Verdan Semajnon“ en la unua semajno de septembro. Kiam la Federacio estos lege aprobita, oni partoprenos en la ekzistanta Ekzamena Komitato por instigi la laboristojn studi por Esp. diplomo. K-do Chr. Camper partoprenos la fakan kunvenon de Lab. Esp. Soc. „Unueco“ en Helsinko (vidu ET 91). Oni esploros eldonon de intermembra informilo almenaŭ sesfoje jare kaj eldonon de propra lernolibro por Esperanto.

Ni citu traŝan ekzemplon el la malferma parolado de la prezidanto. Li skizis la entuziasmon, kiu regas ankaŭ inter laboristoj por la piedpilka ludo, dum oni pri seriozaj aferoj, kiel la nia, tute ne interesiĝas. Dum la unua duono de la semajno oni parolas pri la okazinta kaj dum la dua duono pri la okazonta vetbatalo. Kaj kiam oni demandas,

pro kio ili tiom freneze diskutadas pri la piedpilka ludo, ili respondas: Ho, sinjoro, se vi nur konus! Same estas kun Esperanto. Se oni nur konus ĝin! Kaj li esperis, ke tiu ĉi kongreso donu al la partoprenantoj insligon paroli unuan duonjaron pri la okazinta kaj duan duonjaron pri la okazonta kongreso.

## Oficistoj.

### Faka kunveno en Danzig.

Dum la XIII-a en Praha okazis i. a. aparta kunveno de privataj, ŝtataj kaj komunumaj oficistoj, kiun ĉeestis reprezentantoj de 10 ŝtatoj kaj de 8 fakoj de la ŝtata aktiveco.

Ĉar la anoncita nunjara faka kunveno ne povos okazi en Helsinko, pro teknikaj kaŭzoj, kaj ĉar kelkaj eminentaj organizantoj el Meza Eŭropo t.e. povos ĉeesti la XIV-an, la Organiza Komitato de la Internacia Oficista Esp. Asocio decidis okazigi la oficistaran subkongreson dum la Danziga Antaŭkongreso. Ni kore invitas tutmondajn samfakanojn veni tien kaj kiel eble plej multnombre.

Adolfo Oberrotman,  
prov. hon. prez. de I. O. E. A.

## Kongresanoj al Helsinko, atentulo!

### Ni ricevis sekvantan telegramon:

Praha 7, 18 julio. Ĉeĥoslovaka ministerio donas kvindek-procentan rabaton je vizo al kongresanoj traŝtataj Ĉeĥoslovakio, prezentantaj kongreskarton; ĉiuj ĉeĥaj legacioj informitaj.

Ĉeĥoslovaka Asocio Esperantista.

## Junularo.

Okaze de la 11-a Germana Esperanto Kongreso la „Asocio de Junaj Germanaj Esperantistoj“ estis nove organizita. Ĉiuj junaj germanaj samideanoj devas aliĝi al A. J. G. E. Ĉar nur se la junularo unuigigas, nia movado povas kreski kaj flori. Aliĝiloj estas haveblaj ĉe la sekretario.

La kotizajoj estas: membroj germanaj 15.— mk., membroj eksterlandaj 25.— mk., junulaj grupoj pagas po membro 12.— mk. jare.

La A. J. G. E. aliĝis al la G. E. A. korporative kaj pagas po membro 2 mk. Do junularo aliĝu tuj, por ke ni havu je la venonta kongreso en Plauen pli ol 1000 membrojn.

Informojn donas la sekretario: Erich Habelok, Breslau 10, Schlegelmacherstraße 19.

## Diversaĵoj.

### Tutsvisa Gimnastika Festo.

De la 21.—25. julio okazas en la urbo St. Gallen — konata centro de la svisa brodaj-industrio — la tutsvisa gimnastika festo kaj konkuro, en kiu partoprenas pli ol 15000 gimnastikistoj el ĉiuj partoj de Svisujo. Ankaŭ diversaj grupoj el la eksterlando i. a. la svisa gimnastika societo Hudson County U. S. A. alvenis. Pro la ĝis nun nevidita grandega partopreno la festo devas esti dividata en du partoj. Oficiala tago estos lundo, la 24. julio, je kiu okazos granda parado.

Interesemuloj skribu pro informoj al la Esp. Societo St. Gallen aŭ la delegito de UEA.

## Hebreoj.

### Por TEHA.

La subskribinto, kiel provizora afergvidanto de TEHA, scilgas per ĉi tio la samideanojn, anojn de TEHA, kiuj partoprenos la antaŭkongreson en Danzig, ke li verŝajne venos Danzigon kaj volonte persone kunvenus kun ili por preparoli la aferon de la Helsinko a. t. n. faka kunsido de hebreaj Esperantistoj, kiun li ne povos partopreni.  
Kraków, 12. 7. 1922.

Leopold Dreher.

## Mallongaj Esp. Scilgoj.

### Aŭstralio.

Kursoj funkcias en Melbourne kaj najbaraj urboj Essendon kaj Northcote.

### Usono.

En Philadelphia 3 kursoj kun 25 p., en Detroit 2 kursoj kun 16 p., en Cleveland kurso kun 8 gimnazianoj, en Washington kurso kun 6 studentoj, en San Francisco 2 kursetoj.

### Jugoslavio.

Laŭ „Konkordo“ funkcias kursoj en Ljubljana, Bakar kaj Krizevci. Manifestacio de Zagrebaĵ Esperantistoj okazinta la 6. majo rezultigis gajnon de pli ol 1000 jugosl. kronoj.

Zagreba Foiro promesis aranĝi ekspozicion ĉe la foiro kaj uzi Esperanton oficiale en la servoj de la foiro same kiel aliajn lingvojn.

### Germanujo.

Novaj grupoj en Achim, Freiburg (katolika) kaj Gerstungen; kursoj en Freiberg, Freiburg, Hagen, Nürnberg, Oederan, Saarbrücken, Syke kaj Zittau.

### Italando.

En Milano komenciĝis unuagrada kaj duagrada kursoj; aliaj kursoj en Udine, Venezia kaj Mirano apud Venezia.

### Bulgarujo.

La aprila-maja numero de „Bulgara Esperantisto“ raportas pri kursoj en Ruse (30 p.), Kirgali, Plovdiv kaj Tirnovo (30 p.). Nova grupo en Ĉelopeĉ apud Pirdop.

La IX-a Kongreso de Bulgaraj Esperantistoj okazos la 6.—8. aŭgusto en Sofio.

La grupo „Esperanto“ en Pleven vigle laboras kaj havas propran legejon (malferm. ĉiutage de

2—7 h.). La grupo aranĝas grandan loterion kun 10000 biletoj. La gajno estos por eldono de Esp. verkoj tradukitaj el bulgara lingvo. Adreso de la grupo: Skobeleva 23, Pleven.

## Pri la kontraŭ-Esperanta cirkulero de la franca ministro de instruado.

Jen kion skribas la julia numero de „France-Esperanto“ pri tiu afero:

„En ĉiuj francaj Esp. medioj oni transdonas de mano al mano kopiojn de la cirkulero adresita sub la dato de 3. junio de la Ministro de Publika Instruado al ĉiuj rektoroj de Universitato de Francujo por malpermesi al ili toleri en siaj liceoj la nedevigan instruadon de Esperanto.

Ĉi tiu cirkulero, en kiu amasiĝas la plej malveraj kontraŭveraj apud argumentoj de plej ĉagreniga malriĉeco, restas — sume — la plej bona reklamo, kiun oni faris delonge por Esperanto. La iraga danĝero, kiun la regantoj, nesufiĉe averŝitaj, notas kun ĉi fervoro, ne sin okupinte por ekzameni elfunde la demandon kaj doni al si kalkulon pri la potenco helpanta de la latina lingvo, de la franca lingvo kaj ideo, kia estas Esperanto, — tiu iraga danĝero, se ĝi ridetigas pro indulgo la Esperantistojn, havas almenaŭ la gravan avantaĝon informi la membrojn de la Universitato pri la progresoj farataj ĉiutage de la artefarita lingvo kreita de Zamenhof.

Ĉi tio estas la oficiala rekono de la utileco de Esperanto per la publikaj aŭtoritatoj, rekono eble ne memvola, sed certe de nediskutebla aŭtentikeco.“

Pri la cirkulero kaj pri Esperanto parolis la Parizaj gazetoj „L'Ère Nouvelle“ (tri artikoloj); „Le Petit Journal“, „L'Avenir“ kaj „L'Intransigeant“.

## Brazilia Nacia Ekspozicio.

En svisa jurnalo aperis lastatempe noto pri la Brazilia Nacia Ekspozicio. Je la fino staris tiu frazo: „La ekspozicio eldonis bele ilustritan prospekton ankaŭ en la internacia helpa lingvo Esperanto; kiu deziras ĝin ricevi senpage, kune kun mallonga resumo germanlingva, skribu al la sekretario de la Svisa Asocio por Komerc Lingvo en Zürich...“

Alvenis pli ol 30 demandoj. La asocia sekretario sendis al tiuj personoj la Esperantan prospekton, pruvante al ili per tio la gravecon de nia movado. Kaj al la Brazilia Nacia Ekspozicio li sendis la demandojn (en originalo) por atesti la efektivan valoron de „reklamo per Esperanto“.

Se oni trovas, ke tiu maniero estas imitinda, oni agu...“

## Parolejo.

### 120. Ŝanco.

Ĉe p. 285, l. 10 de la „Fundamenta Krestomatio“ ni havas la oficialan kaj Zamenhofan signifon de la radikoj (vidu en „Unua Oficiala Aldono“, ankaŭ en la „Vortaro“ de Kabo kaj en ET n-o 88 komence de „Amerika Humoro“ p. 2; sed p. 1, komence de „Se virino lernas Esperanton“, ĝi ŝajne signifas „bonsorto“). Se Esperantaj radikoj malgajnos sian unusencecon, ili ankaŭ ne plu havos sian supercon por leksikonoj. Demandite, kiu estas alilingva vorto por „ŝanco“, oni devos demandi: Ĉu 1. por la Krestomatia signifo, 2. hazardaĵo, 3. bonsorto? Ankaŭ mi rimarkis „oportuno“ por Krestomatia signifo de „ŝanco“ (Ch. G. Stuart-Menteth, London.)

## Gazetaro.

### LIBROJ.

- Nieuwe Hengeloesche Courant, 15. 7. (Manifesto al instruistoj, laŭ ET.)
- Hengelo's Advertentieblad, 15. 7. (Esp. kongresoj kaj interna ideo de Esp.)
- Twenthe en Hengeloesche Courant, 12. 7. (Mondvojaĝo de s-ano Hudson el Melbourne, laŭ „Holanda Esp.“)
- Jutarnji List, Zagreb, 10. 7. (Art. „El la Esp. societo en Zagreb“.)
- Volkszeitung, Bromberg, Pol., 30. 6., 7. kaj 14. 7. (Kun Esp. anguloj.)

## Recenzejo.

### LIBROJ.

- AMFITRIONO. Komedio de Molière; el franca lingvo tradukis E. Legrand. 125 pĝ. 12 18 1/2 cm. Eld. Esp. Centra Librojo, Paris. Prezo 3 fr. fr.
- Rilate la enhavon jam la nomo Molière diras, ke la leganto travivos ĝuoriciajn horojn. Konante ĝin, oni eble dubos antaŭ la legado, ĉu la tuta spirito de l' komedio estas retrovata en la Esperanta traduko, ĉu ne la rimego kaj versigo ĝenas la delikatecon de la lingvo. Sed legante la unuajn paĝojn, oni jam konvikiĝas pri senkaŭzeco de l' timoj. Oni ofte devas miri pri la vere delikataj vortuldoj, kaj ĝis la lasta paĝo oni neniam perdos la gojon pri la bona, simpla laŭfundamenta, preskaŭ klasika lingvo. Mi sincere deziras, ke s-o Legrand ankoraŭ ofte pliricigu nian literaturon, sed eble aperigu venontajn verkojn en malbonvaluta lando. (H. H.)
- ESPERANTO. Mluvnice, vybor članku a slovník Esperantiko-Cesky. Pro samouky a kuray napasala Julie Šupichová. Eldonejo Solc a Šimaček en Praha, Prezo 10.50 kĉ.
- AFIŜOJ, PROPAGANDILOJ, ktp.
- Viena Internacia Foiro, 10.—18. sept. — Bela 6-paĝa prospekteto dukolore presita. Tute en Esperanto. Adreso: Wiener Messe, Wien VII, Museumstr. 1.

### GAZETOJ.

- Teristo. N-oj 2 kaj 3. (N-on 1 ni ne ricevis.) Nova bulteno, dediĉita al serĉado de vojoj celantaj al la realigo de vivo justa kaj harmonia. Adreso: Stan. Szabuniewicz, Moskvo, pošteksto 665.
- Internacia Komerc Revuo, Majo-junio. Aferas de nun ĉe firmo Furrer & Co., Zürich 1, Svislando, Stampfenbachstr. 69.
- Katolika Mondo. N-o 1, 1922/23.
- Esperanto, Julio-aŭgusto. — En artikolo „Idealo kaj realigo“ D-ro Privat avertas pri fantazia revado kaj admonas al metoda laboro per sinksekvaj paŝoj.
- La Semisto. Majo-junio.
- Verda Utopio. Majo.
- Holanda Esperantisto, 13. 7.
- The British Esperantist, Julio.
- Skola Esperantista Ligo, Kvara bulteno. Junio.
- Kataluna Esperantisto, Junio-julio.
- Austria Esperanto-Raporto, N-o 1. Aferas anstataŭ „Nova Tempo“ ne plu eldonebla pro la altaj preskostoj. Adreso: Wien VI, Mollardgasse 55.
- Bulletin de la S. F. pour la propagation de l' Esperanto. N-o 4. Julio.
- Corriere Balcanico-Esperantista, Bari, 30. 6.
- L'Ami des Aveugles (Blindul-Amiko), Paris, Julio. Kun artikoloj en lingvoj franca, Esperanta, germana kaj anglia. Adreso: 41, rue de Chabrol, Paris 10.

19122

### III. Internacia Foiro de Reichenberg

Cehoslovakio  
12.-20. aŭgusto 1922

Plej granda teksa merkato de la kontinento. Ekspozicio specimena-ekspozicio de bohemiaj vitraj, ceramikaj, glazuraj, al bijuterioj, maŝinmerkato, paperfoiro, teknikaj kaj kemiaj produktaj. Metalaj, ledaj, lignaj komercaĵoj kaj ludiloj. Lokaj specialaĵoj.

Generala ekspozicio de komercaĵoj.

Rabatitaj veturprezoj. Faciligo por eniro en Cehoslovakion. Esperanto uzata.

Messeamt Reichenberg  
(Esperanto-Fako) Cehoslovakio.

Nederlanda Anonima Societo  
**Luksa-pano Fabriko**  
antaŭe Henri J. Carels.  
50 Butikoj:  
Den Haag, Haarlem, Amsterdam.  
**Lunĉejo Carels**  
(ĉefo: H.A. Scharwächter)  
63 Weimarstraat, Den Haag.  
Oni parolas Esperanton.

Atentu!  
**Senpaga Reklamo**  
per la  
**Esperanto-Stando**  
de la  
**Foiro de Reichenberg**  
(12.-20. aŭgusto 1922).

Eldonejoj, organizoj, firmoj,  
kiuj deziras esti reprezentitaj, sendu tiujn surscan Esperantan propagando-materiojn por dladono.  
Adreso: Fritz Michalek, Reichenberg, Cehoslovakio, Lerchenfeldstr. 20.

S-ino Therese Husch.  
Fabrikado de prezindaj armetiaj  
**MANLABORAĴOJ,**

ekz. „Jumper“-bluzoj, vestoj, trikitaĵoj el silko aŭ lano, kusenoj, kafujo-capoj, artetikilaĵoj kovritaj ktp., laŭ propraj modernaj kaj laŭ speciale dezirataj specimenoj.

Dresden A (Germ.) Parolebla:  
Blasewitzerstr. 86<sup>II</sup> 12-4 h.  
(Ecke Fürstenastr.)

### Anoncetoj.

Familiaj anoncetoj senpaga. Aliaj anoncetoj (nur akceptataj per minimume du sinsekvaĵaj enpresoj) kostas po du enpresoj kaj po 20 vortoj 0,20 dol., 0,50 fl., 1 nord. kr., 1 fl., 1 sviz. fr., 1 pes., 2 franc. aŭ belg. fr., 5 lir., 7 tmk., 8 kc., 40 gmk., 80 hung. kr., 400 aŭstr. kr., Internacia 5 stamp. resp.-kup.; ĉe reklaĵo abonantoj ni deprenas la pagon por anoncetoj laŭdezire de la abonanto, de aliaj ni enpresas anoncetojn nur post antaŭpago. Anoncetoj devas aŭti 10 tagojn antaŭ publikigo.

PROFESIO SERĈATA. — Absolinto de komerciernejo, kooperativisto, serĉas alian profesion inter germanaj Esperantistoj. Parolas ĉeĥe, Esperante, germane, — Jan Janda, Volarna Ohare, Cehoslovakio.

KOMERCISTOJ KAJ INDUSTRIISTOJ ATENTU! — Oni intencas eldoni vastan gvidlibron tra Varsovio, kiu enhavas ankaŭ specialan parton kun komercaj reklamoj. Firmoj, kiuj volas reklami en la gvidlibro, estas petataj turni sin por ekscii detalojn al la Varsovia delegito de UEA, s-o Adolfo Oberroiman, Varsovio, Krak-Przedm. 10.

AĈETO. — Ni deziras aĉeti aŭ interŝanĝi kontraŭ Esperanto la jenajn numerojn de ET: 8, 13, 15, 17, 18. — Proponu al grupo Esperanto, Skobeleva 23, Pleven, Bulgario.

LETERVESPERO. — Pola Esperantista Societo, Warszawa, str. Królewska 19, petas eksterlandajn samideanojn alsendadi ilustritajn poŝtkartojn por aranĝata letervespero; ĉiu karto estos respondita.

ATENTU! Kolektantoj kaj amatoroj, mi volas vendi kelkajn interesajn kolektaĵojn po 72 fotografiaĵoj laŭ historiaj motivoj: „La Inkvizicio“, teruraj turmentoj al junaj knabinoj, kaj aliaj kolektaĵoj. Prezo je demando. — Alfred Menke, Postfach 513, Bremen, Germ.

EDZIĜON kun nigrahara fraŭlino deziras bela sinjoro. Bildeto estas alsendota. Ofertojn laŭ ĉifro „Edziĝo“ Düsseldorf, Postami 4, poste reatente, H. Fleuwa.



Oni postulu la „Victoria“-Ekspozic-prezliston en germana-hispana aŭ germana-angla lingvoj.

### Esperanto Service Corporation

„Esko“

500 Fifth Avenue New York City  
Telegrafa adreso: Esperanto New-York.

Aĉeto, eksporto, importo kaj maklerado de ĉiuspecaj komercaĵoj.

Katalogoj, prezaroj kaj specimenoj estas danke ricevataj

### Sperta Komercisto

deziras agi kiel sola Agento en Skotlando kaj Nordanglujo

por grava ne-teksa firmo aŭ eksport-sindikato de fabrikistoj. Plej bonaj rekomendoj donotaj, kaj se necese morganarinto povas esti donata.

Preferu oni deziras rilatojn kun firma starigita antaŭ la milito, kiu jam posedis klientaron en Britlando.

Samideanoj bonvolu traduki tiun ĉi anoncon kaj sendi ĝin al gravaj firmoj en via distrikto! — Ofertojn peras la administracio de „Esperanto Triumfonte.“

La malgranda glaciiga kaj malvarmigiga maŝino

„ARKTIS“ estas fabriko de la firma

JULIUS RÖMHELD, Mainz a. Rh. (Germanlando)  
Ferfandejoj, ferkonstruejoj kaj maŝinfabriko.

Unua Tutpola Esperanto Kongreso.

Fotografadoj: 1. ĝenerala, 24: 30 cm, prezo 2000 pmk.  
2. ĝenerala, 18: 24 cm, prezo 1500 pmk.

Havetabl post alsendo de la mono ĉe  
W. Miernicki, Warszawa, Marszalkowska 40.

Lustroj el Kristal-vitro

en ĉiuj stiloj kaj grandoj p.elektra aŭ gasa lumigado, fabrikataj laŭ propraj kaj indikataj skizoj.

Ernst L. Hettich Nachf. Freiburg i. Br. Germ., Rheinstr. 60.

Eksporto al ĉiuj landoj. Kapablaj reprezentantoj serĉataj.

### POŝTMARKOJ!

Danzig I, 5 Pf.-5 Mk. (14 ekzempleroj, germana eldono)	90.—	800.—
Danzig III, 5 Pf.-10 Mk. (10 ekz.) konstitucio	80.—	700.—
Danzig aerpoŝto I, 0.40, 0.60, 1.—	25.—	222.—
Danzig aerpoŝto II, 40Pf.-5Mk. (5 ekz.)	20.—	180.—
Danzig tuberklozo (3 ekz.)	15.—	120.—
Danzig provizoroj 5/30-80/30 (5 ekz.)	15.—	140.—
Slesvigo 2 1/2 Pf.-10 Mk. (14 ekz.)	70.—	600.—
Supra Silezio I, 2 1/2 Pf.-5 Mk. (9 ekz.)	65.—	600.—
Supra Silezio II, 2 1/2 Pf.-5 Mk. (17 ekz.)	40.—	360.—
Saar I, 2 Pf.-1 Mk. (17 ekz.) Sarre	360.—	3400.—
Saar II, 5 Pf.-10 Mk. (21 ekz.)	120.—	1000.—
Saar III, 5 Pf.-25 Mk. (16 ekz.) Pariza eldono	320.—	—
Memel aerpoŝto, 80 Pf., 1.—, 2.—, 3.—, 4.—	60.—	550.—
Memel (franca eldono) 5, 10, 15, 20, 30, 40, 50, 60, 80 Pf., 1.—, 1.25, 2.—, 4.—, 10.— Mk.	90.—	820.—
Memel (franca eldono) nova 25, 40, 75 Pf., 1.—, 1.25, 1.50, 2.—, 5.—, 6.—, 9.— Mk.	80.—	700.—
70 diversaj poŝtmarkoj de Danzig, Saar, Memel, Supra Silezio	50.—	450.—
25 diversaj paroj da germanaj „Têtes-bêches“ kaj erarpreso	80.—	700.—

La prezoj en germana marko. Mi kalkulas: 100 germ. mk. = 0.50 dolaro, 1 guldeno, 1 1/2 ŝilingo, 1 1/2 sveda aŭ dana krono, 2 norveĝaj kronoj, 2 svizaj frankoj, 2 1/2 pesetoj, 4 francaj aŭ belgaj frankoj, 7 liroj, 15 finnl. mk., 17 ĉ. kronoj, 310 hung. kr., 1500 pol. mk., 6600 aŭstr. kr.

Antaŭpago per monbiletoj de ĉiu lando (en registrita letero).

Afranko: eksterlando 10 gmk., Germanl. 5 gmk.  
E. SCHULTZE, Rogzow bei Köslin, Germanlando.

### Abonejoj de ET

en la landoj

Aŭstra: Ferd. P. Huber, Mörsberg 5, Salzburg; por Wien „La Esperantisto“ (d-ro E. Pfeffer), Wien II/1, Postami 54  
Belga: Frans Schoofs, 45, Kl. Beerstraat, Antwerpen. Poŝtĉeka n-o 284 20.

Bulgara: Georgi Ĥr. Gaŝevski, Bul. Marie Luiza 46, Sofia.  
Ĉehoslovaka: Otto Sklenčka, Hradec Králové. Otto Lumpe, Trautenau.

Estona: Est. Esp. Unuiĝo, postkast 6, Tallinn.  
Finna: O/Y. Movado A/B., Kasarminkatu 20, Helsinki.  
Franca: Esp. Centra Librejo, 51 rue de Cligny, Parizo 9.  
Hispana: Konrado Doménech, Caldes de Malavella, prov. Girona, Vichy Catalan.

Hungara: Paŭlo Balkanyi, Hajos-utca 15-II-2, Budapest VI.  
Japana: Morizo Ga, 16-V, Kitamači, Aojama, Tokio.  
Jugoslava: D-ro Dušan Maruzzi, Zagreb, Jezuitska ul., br. 1.  
Litova: Paŭlo v. Medem, Smellu g-ve 12, Kaunas (Kovno).

Nederlanda: J. Ravestein Jr., v. Aerssenstraat 200, 's-Gravenhage. (Poŝtĉeka konto Haag n-o 2578)  
Pola: Adolfo Oberroiman, Krak-Przedm. 10, Warszawa. (P. K. O. n-o 8125). — Pola Esp. Servo (Fr. Prengel), Kordeckiego 1a, Bydgoszcz-Bromberg.

Rumana: Esperanto-Oficejo Cluj.  
Sveda: Förlagsföreningen Esperanto, u. p. a., Stockholm 1 U. S. A.: The Esperanto Service Corporation, 500 Fifth Avenue, New York City.

### Anoncoficejo kaj Gazetoficejo „Promien“- (Radio)

Warszawa, str. Widok 19

akceptas anoncojn por ĉiuj jurnaloj de la mondo, peras abonon de ĉiuj gazetoj.

Oni korespondas Esperante.

MALAPERINTINO. — Georgo Deŝkin, Moskvo, Mjasnickaja 21, loĝ. 15, petas personojn sciantajn ion pri lia edzino Tajjana Matveevna KREMLI, forveturinta en 1920 el Novorossijsko eksterlanden, sciigi lin pri tio. Koran antaŭdankon al ĉiuj!

KURACISTVIDVINO akceptos du junajn, klerajn alilandulinon. Plena pensio kaj familia aligo. Muzika kaj lingva instruado en la domo. S-ino D-ro Hempel, Dresden-A, Zoellnerstr. 19. Rekomendita de s-ino Marie Hankel.

GRAVA INFORMILO por ĉiu korespondanto kaj kolektanto! BES'a Adresaro. Prezo 1.50 sviz. fr. (sendkostoj 3 gmk.), por germanoj 35 mk. (sendkostoj 1.50 mk.). — Havebla ĉe Esperanto Eldonejo Butin & Jung, Godesberg, Germ.

### Korespondo kaj Interŝanĝo.

F-ino Gilberte Bogaert, 19-jara studentino, Klapdorp 16, Antwerpen, Belgio, deziras korespondadi per bildkartoj.

F-ino Ottilia Lang, privat-oficistino, Brašov, Rumanujo, Siroto Kapu-utca, deziras korespondi per leteroj kaj poŝtkartoj ilustr. kun ĉiulandanoj.

Gregoro Lempert, Riga, Latvio, Skolas iela 4, deziras korespondad kun ĉiuj landoj per poŝtkartoj ilustr. kaj leteroj, precipe kun eksterŝanĝoj.

Geo. J. Kvejtman, Lodz, Pollando, Przejazd 14, deziras korespondi kun ĉiulandanoj per poŝtkartoj kaj leteroj, interŝanĝas papermonojn, poŝtmarkojn ktp.

F-ino Caroline De Buyser, instruistino, deziras interŝanĝi vidajkartojn kaj tipojn ĉiulandajn. Krijststraat 37, Berchem-Antwerpen Belgio.

S-o Tadeusz Kapela, ul. Zórawia 19, Poznan 3, Pollando deziras korespondi pri diversaj temoj per poŝtkartoj ilustr. kaj leteroj kun tulmondaj samideanoj.

S-ano M. Alter, Lodz, Pollando, Piotrkowska 87, deziras korespondi per poŝtkartoj ilustr. kaj leteroj kun la tuta mondo.

Sportistoj: Geo Kvejtman, Lodz, Pollando, Przejazd 14, kaj Boleslao Fajin, Lodz, Gdanska 35, deziras korespondi kaj interŝanĝi sportajn revuojn kun ĉiulandaj sportistoj.

Johano Miravillas kaj Valls, strato S-ta Domingo n-o 4, 1er piro, Manresa, provinco Barcelona, Hisp., deziras korespondi per poŝtkartoj ilustr. kaj interŝanĝi poŝtmarkojn.

S-o Erik Engdahl, Pl. 5, Norrahammar, Svedujo, deziras korespondi.

S-o Rulf Eduard, studento, Lázně Bělohrod, Ĉehoslovakio, deziras korespondadi kun samideanoj en la tuta mondo per poŝtkartoj ilustr. (bfl.), poŝtkartoj kaj leteroj; interŝanĝas poŝtmarkojn.

Fraŭlo Johano Grat, Carretera de Vich 41, Manresa, Hispanujo, deziras korespondi per poŝtkartoj kun samideanoj ĉiulandaj.

Rudolf Pivl, Trautenau, Bohemlando, deziras interkorespondadon pri ilia konstitucio kaj rilatoj al urba ĉef-societo. Petas ankaŭ statutojn.

S-o Ladislao Krisl, instruisto, Dresden 6, Böhmische Str. 21, II., deziras interŝanĝi leterojn kaj poŝtkartojn kun ĉiuj landoj.

S-o Vasilij Aleksandrovici Volkov, Rusujo, Tver, 1. Verhovskaja d. N. 96, deziras korespondi pri aktualaj kaj aliaj seriozaj demandoj.

Deziras korespondi kun gelaboristoj de ĉiuj landoj Petro Katzbauer, Gradenberg 92, poŝtejo Köpfach, Sillro, Aŭstrio.

S-o Oswald Wittig, komercisto, Merseburg a. S., Germ., Klausentor 3, deziras interŝanĝi leterojn pri seriozaj temoj; ankaŭ korespondas per poŝtkartoj, interŝanĝas Esp. gazetojn.

**Dr. Vogt'sche Bank, Stuttgart, Germ.**  
Wallruthbau Komandit-Societo Friedrichstr. 13  
Telefona: N-oj 11438 kaj 11459. Telegr. Adreso: Bankvogt.

Aĉeto kaj vendo de valorpapiroj.  
Procentado de kontantaj deponoj.  
Aĉeto kaj vendo de fremdaj valutoj.  
Perado de ĉiuspecaj negocoj.

**Komerciajn interrilatojn, reprezentadon**

serĉas

Peter Becker, Delegito de UEA,  
Mainz a. Rh. Germ. Augustinerstr. 58.

**ET numero 100**

(jubilea numero) aperos la 3-an de septembro 1922 en eksterordinare granda eldonnombro kaj minimume 6-paĝa, kun speciala 16-paĝa literatura aldono

Al varbontoj de **ANONCOJ**  
(ne anoncetoj) por tiu ĉi numero ni konsentas **Rekompencojn de 30%**

La prezo de anoncoj por tiu ĉi numero estas por ĉiuj landoj po centimetro-kvadrato 5 gmk., sed sen rabato por la anoncetoj.

**Itala Vino**

Unuakvalitajn vinojn de la Piedmonto kaj Toskanio eksportas al ĉiuj landoj

La Firma **GIOVARA Fedele**  
Via Ciamarella 5, Torino (Italio).

Plej granda serlozejo.  
Oni korespondas prefere Esperante.

**Anoncoficejo kaj Gazetoficejo „Promien“- (Radio)**

Warszawa, str. Widok 19

akceptas anoncojn por ĉiuj jurnaloj de la mondo, peras abonon de ĉiuj gazetoj.

Oni korespondas Esperante.

Fraŭlo Henriko Bayer, komercisto, Saalfelden, Lando Salzburg, Aŭstrio, deziras korespondi per ilustr. poŝtkartoj.

F-ino Julia Danckaerts, Provinciestraat 86, Antwerpen (Belgiujo) deziras korespondi per poŝtkartoj kaj leteroj kun ĉiuj landoj.

J. Oulehla, oficisto de sukerfabriko Skrivany, Novy Bydov, Bohemio, deziras ĉiujn poŝtmarkojn de Rusio, Siberio, Ukrainio, Baltaj ŝtatoj, Belgio, Danio, Islando ktp., prefere neuzitajn, kontraŭ poŝtmarkoj de balkanaj ŝtatoj, oriento, Esp. gazetoj, libroj, poŝtkartoj aŭ kio ajn.

S-o Jozefo Ŝulman, Sieradz, Polujo, deziras korespondi letere precipe pri historio kaj interŝanĝi poŝtkartojn ilustr., poŝtmarkojn, papermonojn kaj Esperantajojn, prefere kun samideanoj de baltaj, balkanaj, skandinaviaj, orientaj landoj k-t anglaj kolonioj.

Geedzoj Liudas Alejka kaj Marija Lukoševičaitė post sia geedziĝo deziras ekkomenci korespondadon kaj petas noti ilian novan adreson: Birzai, Litovujo.

S-o Eugène Ejlenne, 19 rue Huarri-Chapel, Charleroi, Belgio, deziras korespondi kun Esperantistino, prefere norvega, serba, rusa aŭ germana.

S-o Francisco Daroczy, studento, Magyarvista (Nadaŝel, Colocna, Rumanujo) deziras korespondi kun ĉiulandanoj, interŝanĝas poŝtmarkojn (sendu 50-200 rekomendie).

Buenos Aires, Y. M. C. A., Jozefo Benages (antaŭe en Habano). — Mi korege dankas miajn paciencajn korespondantojn, al kiuj mi estis devigita prokrasti la respondon pro amaso da leteroj, poŝtkartoj ktp., ankaŭ pro la preparado de mia interesega longa ŝipvojaĝo tra la Pacifika Oceano, vizitado de urboj kaj samideanoj. Por hodiaŭ mi koralutas ĉiujn kaj laŭeble respondos.

John A. Stover, 1944, S. Alden Str., W. Philadelphia, Usono serĉas korespondantojn en ĉiuj lokoj de la mondo.